# FRATECO

marto 2003 † „vi ĉiuj estas fratoj" (Mat 23,8) ↓ numero 59

trimonata bulteno ♥ por la spirita formado kristana en esperanto ✪ la neŭtrala lingvo universala

redakcia adreso: Reformacka 4, PL - 31-012 KRAKÓW


# ENHAVO


2. Antaŭvorto: Legantoj skribas...
3. Kanto por Karesmo: Mia popolo
... por Pasko: Morton venkinte
4. Ne kaŝu vin, kiam mi bezonas vin
5. El la unua, dua, tria kaj kvara mondoj, ni kreu unu mondon!
6. Tirkesto t.e. kiel rekomenci
7. La itinero de Pilgrimanto
11. Ni konstruu civilizacion de amo
12. Progresante en la lumo
14. Mi iras kun Jesuo (La kalvaria vojo)
19. Mi timas la morton
21. Kompensa diservo
22. La pasiono kaj la resurekto ... motivo de la neskuebla espero
25. Fidela al la idealoj de Sankta Francisko
26. Preĝo por la beatproklamo de Alojzo Kosiba
26. Sekcio Esperanto de KIK
27. Antaŭ la hejmfenestro · Ĉi-jara pilgrimo...al Łag.
28. Danko · Burĝono
29. Frato · Sensumo de printempo · Ĉiutage
30. Al Pastro Henriko Paruzel · La danco de l'arboj
31. La hundeto Mikuś
32. Ciganineto Veska
34. Mia filo · La dua preĝtago
35. Vero konfirmata de la vivo
36. Kial oni lernas lingvon?
37. Ĉu Eŭropo efektive ...
38. 16a Ekum. Kongreso...
39. Esperanto.. kio estas?
40. Ridetu

# Antaŭvorto

Karaj Legantoj!

Kiam mi meditis kion mi skribu en antaŭvorto al FRATECO numero 59, komence de la jaro 2003, venis en mian kapon la penso, ke bone estos prezenti la opiniojn de kelkaj legantoj pri la bulteno FRATECO. Jen kion **Legantoj skribas...**

Estu laŭdata Jesuo Kristo!

Koran dankon pro la 58a numero de FRATECO kaj pro la aldonaĵo kiu estas bona lernilo por komencantoj. Ankaŭ aperis *Pola Esperantisto*. Ĉu ĝi fariĝos same bona kiel FRATECO? Ni vidos.

Al FRATECO mi deziras multajn sukcesojn, por ke ĝi daŭre riĉigu niajn korojn kaj animojn. Mi kore salutas kaj kunigas la abonkotizon por nuna jaro. Dian Benon tutkore deziras via

*Henryk Żygowski*

(...) Vere, „Frateco", estas laŭdinda revuo kaj mi gratulas vin pro ĝi. Koran, koran dankon pro ĉio! Dio benu vin!

*Lina Gabrielli*

Konfirmante la ricevon de la revuo "Frateco" n-ro 57a, mi esprimas al Vi miajn ege korajn dankvortojn. Ĝia tuta enhavo – kaj aldonitaj instruigaj folietoj por infanaro, estas vere legindaj, perfekte redaktitaj kvazaŭ didaktikaj instru-helpiloj. Ĉiam pli kaj pli abundaj tekstoj kaj poeziaĵoj, kreas entute ege valoran laŭlingve kaj laŭsence literaturon por ĉiuj legantoj. Ankoraŭfoje mi esprimas al Vi miajn sincerajn gratulvortojn kaj amikajn dankojn pro tiel bone kaj lerte redaktita revuo. Ĉiam mi legas ĝin kun granda interesiĝo kaj plezuro.

*Marian Kostecki*

Bonan legadon, preĝadon, meditadon, pensadon kaj ...

***"Feliĉan Paskon en Kristo resurektinta"!***

deziras *P. Stanisław Płachta OFM*

---

La jarabono por FRATECO

[20 PLZ] pagenda al: P. Stanisław Płachta
Reformacka 4
31-012 KRAKÓW

---

# Kanto por Karesmo

**Mia popolo**, ĉu mi kulpe venis, / ĉu vin tristigis aŭ ĉu vin mi ĝenis?
De l' faraono mi vin liberigis;
krucon sur brakojn vi por mi pretigis.

Mia popolo, ĉu mi kulpe venis, / ĉu vin tristigis aŭ ĉu vin mi ĝenis?
Por vi preparis mi la benan sorton;
por mi pretigis vi kruelan morton.

Mia popolo, ĉu mi kulpe venis, / ĉu vin tristigis aŭ ĉu vin mi ĝenis?
Mi vin kultivis kiel dolĉan viton;
al mi vi donis nur vinagr-acidon.

Mia popolo, ĉu mi kulpe venis, / ĉu vin tristigis aŭ ĉu vin mi ĝenis?
Punis Egipton mi por vi, popolo;
estis skurĝita mi laŭ via volo.

Mia popolo, ĉu mi kulpe venis, / ĉu vin tristigis aŭ ĉu vin mi ĝenis?
Vojon transmaran mi por vi apertis;
vundon de lanco mi en brusto spertis.

Mia popolo, ĉu mi kulpe venis, / ĉu vin tristigis aŭ ĉu vin mi ĝenis?
Vin plej supera faris mi nacio;
inter krimuloj mia pozicio.

*Ludu, mój ludu* [A: 302]

# Kanto por Pasko

**Morton venkinte** / kaj inferan plagon,
iris el tombo / Krist' la trian tagon.
Ĉiuj admiras kvazaŭ Jonan novan
la venkipovan. Haleluja.



Tero ektremis, / timis la gardistoj.
Diris anĝelo / ĝoje al la tristaj:
Tombo malplenas, fort' de l' morto svenis,
Kristo elvenis. Haleluja.

Cedu malĝojo, / malaperu ploro,
ĉar nun triumfas / la Savint' en gloro.
Li niajn ŝuldojn por ni pagi volis,
ĉiujn konsolis. Haleluja.

*Zwycięzca śmierci* [A: 061]

---

# Ne kaŝu vin, kiam mi bezonas vin

Kara amiko,

Dum du jaroj ni bonege amuziĝis. Ni kune tenisludis; ni kune feriis ĉe la marbordo; dum semajnfinoj, ni kune vizitis trinkejojn kaj dancejojn. Kaj ni multege ridis. Ni primokis aliajn homojn, ni flirtis kun belaj knabinoj, ni kune planis petolaĵojn.

Kaj tiam subite mi ekhavis problemojn en mia laboro. Tio nervozigis min. Sed vi ne emis aŭskulti min kiam mi parolis pri tio. Tute neatendite, mi perdis mian laboron kaj ne trovis novan. Kaj kiam mankis al mi mono por daŭrigi nian antaŭan diboĉan vivon, vi pli kaj pli forgesis viziti aŭ inviti min. Subite multaj zorgoj ekaperis samtempe. Estis kvazaŭ mia tuta mondo disfalis. Mi bezonis amikecon, konsolon, komprenemon kaj helpon... Mi multfoje telefonis al vi. Sed pli kaj pli mi rimarkis ke mi tedis vin. Kaj vi neniam plu aperis en mia loĝejo.

Feliĉe iom post iom mi venkis miajn krizojn. Mi preskaŭ sukcesas vere adiaŭi mian patrinon. Hazarde, mi revidis vin. Vi denove invitis min por akompani vin. En la mizera periodo, kiun mi travivis, mi ekkomprenis kiom supraĵa estis nia amikeco. Mi komprenis, ke mi bezonas veran amikon, iun, kun kiu mi povas dividi mian vivĝuon sed ankaŭ miajn timojn, miajn zorgojn kaj miajn problemojn.

Mi konsilas al vi, ke ankaŭ vi serĉu pli profundan amikecon. Iam ankaŭ venos fino al via vivo, kiu konsistas el nura „ĉasado" de plezuroj. Kaj tiam ankaŭ vi malkovros, ke viaj „amikoj" emas kaŝi sin kiam vi bezonas ilin. Mi deziras al vi pli agrablan sperton!

*MsN*

---

# El la unua, dua, tria kaj kvara mondoj, **ni kreu unu mondon!**

„En kia mondo ni vivas, patrino?"

Tiu parodia frazo el famkonata literatura verkaĵo bone esprimas nian senton pri la hodiaŭaj realaĵoj. Tra la tuta historio trafis la homaron malsato kaj malsano, povreco kaj milito. Aldoniĝis al ĉi tiuj kruelaj torturoj la premoj de la kulturo. La mondo dividiĝas en diversaj popoloj, ŝtatoj, lingvoparolantaj kaj religiaj grupoj. Ĉu Esperanto povos doni solvon por almenaŭ la lingvoproblemo?

Ni kune konstruu unu mondon!

Ĉu vi konas la 1-an, la 2an, la 3an kaj la 4an mondojn? Homoj ofte emas enŝrankigi aŭ klasifiki ĉion. La 4a mondo estas konsiderata la nuntempa povrularo en ajna grandurbo de la mondo. La 3a mondo estas la tiel nomataj evoluolandoj. Ĉu ni devas klarigi kio estas la 1a kaj la 2a mondoj? Se homoj kaj popoloj ne helpas unu la alian solidare, baldaŭ ne plu ekzistos vivo.

Ni kreu unu mondon!

Mondo, en kiu ne la mono kaj la povo plej gravas, sed la „amo" por la homo, por ĉiu homo. Mondo, en kiu ni politike kaj ekonomie pensas, sed surbaze de la malgranda kaj malpova homo. Ĉar tie, kie bonas por la malgrandaj, malpovaj kaj malriĉaj homoj, tie bonas por ĉiu. Tio ĉi estas revo, kaj tiun ĉi revon oni konservu kaj realigu.

*MsN*

---

**En ĉiu vizaĝo serĉu homon.**

* * *

**Neniam estas tro malfrue, por repaciĝi,**
**ĉar neniam estas tro malfrue, por ami,**
**kaj neniam estas tro malfrue, por feliĉi.**

*Phil Bosmans*

---

# Tirkesto t.e. kiel rekomenci

*Tio, kio naskiĝas el la karno, estas karno; kaj tio, kio naskiĝas de la Spirito, estas spirito. Ne miru, ke mi diris al vi: Vi devas esti denove naskitaj.* (Joh 3, 6-7)

Vi decidis ekfuriozi. Vi iris kunlabori kun Dio. Almenaŭ en la deklaracioj. Vi ekkredis, ke la kredo faras eblaj maleblaĵojn. Almenaŭ vi penas kredi je tio. Sed ĉu vi donis al Dio la plenan aliron al vi? Ĉiam estas malmulte en vi da spirito. Do vi devas naskiĝi refoje. Naskiĝi de la Spirito. Vi devas ekrigardi la vivon, la mondon per novaj okuloj kaj en nova perspektivo. Vi devas ankaŭ vin mem ekvidi en nova lumo. Se vi faras ordigadon, ĉu vi povas ordigi en tirkestoj la malordigitajn etaĵojn, nur traŝovante ilin, translokigante de loko al loko? Tiel vi ne atingos la ordon. Oni devas elŝuti ĉion sur la plankon kaj komenci denove enmeti. Tiel ankaŭ vi devas naskiĝi denove. En via vivo devas ekregi nova ordo. Temas ĝuste pri ĉi tiu ordo en *tirkesto*.

Estas Dio, estas resurekto, estas eterno. Estas ĝuste tiu nova lumo – fonto, kiu donas vivon. Ekrigardu denove la problemojn kaj ekridu! Ekvidu ilin en la lumo de eterno, en la lumo de savo. Ekrigardu la vivon tra la resurekto! Kiucele Kristo resurektis? Tiom granda mistero, ke estas malfacile pensi pri ĝi. Vi sentas kapturnon. Ĝuste pri tio temas. Via mondo komencas disfali. Tio estas bona signo.

Trablovu vin la Dia Spirito, por ke malaperu en vi la rigideco kaj obskuro, kaj ke vi komencu vivi la novan vivon – vivon en la suno... Naskiĝi denove. Jes, tio estas ĝuste la vera furiozo, furiozo de enamiĝo!

[Andrzej Zając OFMConv, *Kiel reakiri la entuziasmon de vivo*, p. 47, tr. SP]

---

**Anstataŭ veadi kaj malbeni tenebrojn, ekbruligu kandelon, por ke iu ne elbatu al si la dentojn.**

(*Father Keller*)

---

# La itinero de Pilgrimanto

## Kroniko de la papaj vizitpilgrimoj en Pollando



## (unua pilgrimo)

2-10 junio 1979

La gvidpenso: "**Ekkonu Kriston!**"

(Warszawa – Gniezno – Częstochowa – Kraków – Kalwaria Zebrzydowska – Wadowice – Oświęcim – Nowy Targ – Kraków)

Post ok monatoj ekde la elekto je episkopo de Romo, Johano Paŭlo la dua, pola papo venis al sia hejmlando. Tiuj ĉi tagoj ŝanĝis la polojn. La 2an de junio en la Placo de la Venko en Varsovio eldiritis la vortoj, kiuj fariĝis parto de la pola historio: *„Descendu Via Spirito! Kaj Ĝi renovigu la vizaĝon de l' tero. De ĉi tiu tero!"* Ĉi tiuj vortoj havis efikigan forton. Kun ĉiu pilgrimtago la poloj ĉiam pli amase kaj pli atente aŭskultis la papon. Kaj li vekantis la senton de libereco kaj identeco. En la lasta pilgrimtago, sur la Grandherbejo de Krakovo, li estis vokanta: *"Vi devas esti fortaj! Vi devas esti fidelaj!"*. Unu jaron poste okazas la eventoj de Aŭgusto, ekestas la "Solidareco".

## (dua pilgrimo)

16-23 junio 1983

La gvidpenso: "**Pacon al Vi, Pollando, Patrujo mia!**"

(Warszawa – Niepokalanów – Częstochowa – Poznań – Katowice – Częstochowa – Wrocław – Góra Świętej Anny – Kraków)

*„Mi venas, por esti kun miaj samnacianoj en la precipe malfacila momento de la historio de Pollando"* – diris Johano Paŭlo la dua al generalo Jaruzelski, komencante la duan pilgrimon. Private la papo renkontiĝis kun Lech Wałęsa [leĥ vaŭensa]. Li vokis la respektadon de la fundamentaj rajtoj de la homo. Ĉiu renkonto kun la papo estis la okazo por manifestacio, ke la "Solidareco" vivas.

## (tria pilgrimo)

8-14 junio 1987

La gvidpenso: "**Jesuo... aminte siajn... amis ilin ĝis la fino**" (Joh 13, 1)

(Warszawa – Lublin – Tarnów – Kraków – Szczecin – Gdynia – Gdańsk – Częstochowa – Łódź – Warszawa)

Dum la tria pilgrimo Johano Paŭlo la dua parolis „al ni kaj por ni". Li revivigantis la strangolitajn esperojn de la samnacianoj. La ĉefa evento estis la Sankta Meso en Zaspa de Gdańsk la 12an de

junio. Johano Paŭlo la dua instruis, kio estas solidareco. *"Solidareco – tio signifas: unu kun la alia, kaj se ŝarĝo, do ŝarĝo portata kune, en komuneco. Kaj do neniam: unu kontraŭ la alia".*

## (kvara pilgrimo)

### 1-9 junio || 13-16 aŭgusto 1991

La gvidpenso: „**Danku al Dio** (...). **Ne estingu la Spiriton**".

(kp. 1 Tes 5, 18-19)

Dekalogo – „Descendu Via Spirito! Kaj renovigu la teron"

(Koszalin – Rzeszów – Przemyśl – Lubaczów – Kielce – Radom – Łomża – Białystok – Olsztyn – Włocławek – Płock – Warszawa; || Kraków – Wadowice – Częstochowa – Kraków)

Tio estis la unua pilgrimo en la libera Pollando. Sed malfacila. En la lando disvolviĝadis diskuto pri la ŝtatformo, pri la ĉeesto de la Eklezio en la publika vivo, kaj la poloj malprudentiĝis pro la reakirita libereco. Johano Paŭlo la dua rememorigantis, ke la *"liberecon ne eblas nur posedi, oni devas ĝin konstante konkeri"* kaj ke nur la vero *„igas liberaj la homojn kaj komunumojn"*. Sur la sojlo de la libereco li efektivigis la „grandan nacian rekolekton", kaj apogis ĝin sur la dekalogo. En Radom li akre elpaŝis kontraŭ aborto. Li parolis, ke al la „sepultejo de viktimoj" de la 20-jarcentaj totalismoj oni aligas hodiaŭ la alian grandan tombejon: de la nenaskitoj. En Lubaczów li ekstaris defende al la Eklezio. Li agnoskis, ke la postulo neallasi al la publika vivo „la dimension de sankteco estas postulo ateismigi la ŝtaton kaj la publikan vivon".

## (kvina pilgrimo)

### 22 majo 1995

La gvidpenso: „**Esti homo de konscienco**".

(Skoczów – Bielsko-Biała – Żywiec)

## (sesa pilgrimo)

31 majo – 10 junio 1997

La gvidpenso: „**Jesuo Kristo estas la sama hieraŭ, hodiaŭ, kaj ĝis eterneco**" (Heb 13, 8).

(Wrocław – Legnica – Gorzów Wielkopolski – Ostrów Lednicki – Gniezno – Poznań – Kalisz – Częstochowa – Zakopane – Ludźmierz – Kraków – Dukla – Krosno – Kraków)

„*Defendu la krucon, ne permesu, ke la Dia Nomo estu ofendata en viaj koroj, en la vivo familia aŭ socia! Sursum corda! [Supren la korojn!] De la Balta Maro ĝis Tatroj!*" – vokis Johano Paŭlo la dua en Zakopane, kiam sesafoje li venis al Pollando.

## (sepa pilgrimo)

5-17 junio 1999

La gvidpenso: „**Dio estas amo**" (1 Joh 4, 16).

(Gdańsk – Sopot – Pelplin – Elbląg – Licheń – Bydgoszcz – Toruń – Ełk – Wigry, Leszczewo, Studzieniczna – Siedlce – Drohiczyn – Warszawa – Sandomierz – Zamość – Warszawa – Radzymin – Warszawa-Praga – Łowicz – Sosnowiec – Kraków – Gliwice – Stary Sącz – Wadowice – Kraków – Gliwice – Częstochowa – Kraków)

Tio estis triumfa marŝo de la papo tra la lando. La ĉeesto de Johano Paŭlo la dua en la parlamentejo estis legitimado de la pola demokratio. Samtempe la papo pledis favore al tiuj, kiuj ne profitas de la ŝanĝoj. Li parolis: "*Ne estas libereco sen amo*".

## (oka pilgrimo)

16-19 aŭgusto 2002

La gvidpenso: "**Dio riĉa je mizerikordo**".

(Kraków-Łagiewniki – Kraków-Błonia – Kalwaria Zebrzydowska – Kraków)



La papo preĝas en la katedralo sur Vavel-monteto

Tio estis grava pilgrimo de Sankta Patro al Pollando kun grandaj agoj de konfido: al la Dia mizerikordo en Łagiewniki kaj al la Sanktega Patrino en Kalwaria Zebrzydowska. Tiu pilgrimo de Johano Paŭlo la dua ne estis vojaĝo en sentimentalajn rememorojn; ĝi estis rigardo en la estontecon kaj puŝo de la homa historio sur la trakojn indikitajn de Dio.

*Ewa K. Czaczkowska*

La tekston kompletigis
kaj esperantigis
*Stanisław Plachta OFM*

# Ni Konstruu Civilizacion de Amo

*akceptante la prioritatojn de:*

| | | |
|---|---|---|
| **persono** | antaŭ | **objekto** |
| **esti** | prefere ol | **havi** |
| **etiko** | antaŭ | **tekniko** |
| **mizerikordo** | antaŭ | **justeco** |

## Venku malbonon per bono!

*"Venis la tempo, kiam la mesaĝo pri la Dia Mizerikordo*
*povas plenigi la korojn per espero*
*kaj fariĝi la fajrero de nova civilizacio:*
***la civilizacio de amo*".**

Johano Paŭlo la dua

Krakova Grandherbejo, 18.08.2002

# Progresante en la lumo

*„Mi estas la lumo de la mondo. Kiu min sekvas, tiu ne iros en mallumo, sed havos la lumon de la vivo"* – diris Jesuo al siaj disĉiploj kaj al ĉiuj homoj ĉirkaŭe ariĝintaj, en tio ankaŭ al fariseoj, elito de sia nacio. Tio okazantis en la jerusalema templo.

La templo estas loko escepta kaj la vortoj tie eldiritaj akiras rangon esceptan. La publika sindifino de Jesuo en la sankta loko estas programa deklaracio, kaj la vorton *lumo* eblas agnoski kiel ŝlosilon, kiu permesas finkompreni la sencon de Liaj unuopaj agoj kaj vortoj. La atingojn de Jesuo, Lian instruadon, sintenon fronte al Dio kaj rilaton al homoj ni devas kompreni kiel *lumon* por nia persona vivo, t.e. manieron solvi niajn malfacilojn. En la sinteno de Jesuo ni povas trovi respondon al ĉiu demando kaj al ĉiu dubo. Kiam ni ekstaras fronte al laŭvica malfacila situacio, kiam en la koron enŝteliĝas necerteco, tiutempe oni devas atente rigardi – ni diru pli – kontempli la personon de Jesuo.

Tiun ŝlosilon por kompreni la agojn de Jesuo sufloras al ni Johano Paŭlo la Dua, proponante kiel duan parton de la Rozario la misterojn de la lumo.

Ĉiam al ni kredantoj, minacas la danĝero disvolvi piecon certagrade apud la ĉefa rojo de nia aktiveco, kiu estas la vivo profesia kaj familia, ripozo kaj politiko. Dume la rememorigo, ke estas la lumo, kiu posedas kapablon ordigi ĉiujn sektorojn de nia agado, estas al ni tre helpa. Des pli, ke pere de la Rozaria preĝado ĉi tiu rememorigo ĉiam revenantos kaj havas des pli grandan ŝancon formadi nian pensadon.

Ni atentu, ke Jesuo la supre menciitajn vortojn diris al ĉiuj. Sen la Jesua lumo nia pensado kaj, kio sekvas ĝin, engaĝiĝo estas elmetita al risko erari. Pli, estas la vivosferoj, kiuj sen la Jesua lumo

restas mallumo nepenetrebla por la homa racio. Ekzemple: la nuntempa pensado pri la maljuneco kaj sufero sen konsideri tion, kion faris Jesuo, devojigas nin al eŭtanazio.

Kaj kie en la misteroj de la lumo ĉeestas Maria? Johano Paŭlo la Dua atentigas, ke la admono de Maria el Kana Galilea: *„Faru ĉion, kion ajn Li diros al vi"*, estas diskreta fono de ĉiuj misteroj de la lumo. Por neniu pli ol por Maria gravas tio, ke ni en ĉiutagaĵoj iru kun Jesuo.

**1. La bapto de Jesuo en Jordano**
Estu kun ni, ho Maria, kiam venas la Sankta Spirito, por paroli al ni pri la misio de Dia Filo kaj pri la amo de Patro.

**2. La nupto en Kana Galilea**
Estu kun ni, ho Maria, kiam ni spertas mankojn, por ke ni scipovu konfidi ilin al Via Filo.

**3. Alvoko al konvertiĝo**
Estu kun ni, ho Maria, kiam Via Filo alvokas la korojn al konvertiĝo, por ke ni ne apartigu niajn ĉiutagajn aferojn disde la regno de Dio.

**4. Transfiguriĝo sur la monto Tabor**
Estu kun ni, ho Maria, por ke ni, en la plej gravaj vivdecidoj, ne perdu la lumon de Kristaj instruoj.

**5. Instituo de la Eŭkaristio**
Estu kun ni, ho Maria, kiam ni akceptas la sanktan Komunion. La proksimeco de Via Filo urĝigu nin al kresko de nia amo.

*Pas. Johano Novak*
*(„Źródło" [Fonto] 3/2003, p.13; tr. SP)*

# Mi iras kun Jesuo

*(La kalvaria vojo)*

Enkonduko

Sinjoro Jesuo, mi volas iri Vian krucvojon, por danki al Vi ĉar por mi Vi suferis, por pardonpeti Vin por pekoj, plibonigi min kaj komenci la pli bonan vivon.

Mi oferas al Vi ĉi tiun „vojon" intence de ... (*ni nomas la intencojn*) kaj ankaŭ por la suferantoj en la purgatorio.

Unua Stacio: **Jesuo estas kondamnata al morto**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La Savanto akceptas la verdikton de Pilato, por pentofari pro niaj maljustecoj.* Sinjoro Jesuo, faru, ke mi neniam malbone juĝu nek ofendu.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*
*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Dua Stacio: **Jesuo ŝarĝita per la kruco**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*Sinjoro Jesuo volante por ni pardonpeti Dion, obeeme akceptis la krucon.* Sinjoro Jesuo, helpu al ni observi Viajn ordonojn, plenumi Vian instruon entenitan en la Evangelio.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*
*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Tria Stacio: **Jesuo falas la unuan fojon**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La pezo de la homaj kulpoj premis la Savanton al la tero.* Sinjoro Jesuo, gardu min kontraŭ la peko kaj perdo de la sanktiga graco.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Kvara Stacio: **Jesuo renkontas sian Patrinon**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La Savanto renkontis sur la krucvojo sian Patrinon. Kiel ege ambaŭ suferas.* Patrino de Dio, instruu al mi ami mian patrinon – kaj tiun, kiu jam foriris al eterno, kaj tiun, kiu estas ankoraŭ ĉe mi. Jesuo, benu min en la peno de surtera vivo, ke mi neniam perfidu Vin, kaj pridonacu min per la eterna vivo.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Kvina Stacio: **Simono helpas Jesuon porti la krucon**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*Soldatoj devigis Simonon el Kireno, ke li helpu la Savanton penporti la krucon al Kalvario.* Sinjoro Jesuo, instruu min pacience elportadi ĉiujn malagrablojn kaj malsukcesojn.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Sesa Stacio: **Veronika viŝas la vizaĝon de Jesuo**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La kuraĝa kaj bona virino, Veronika, kompatante Sinjoron Jesuon, viŝis per tuko Lian vizaĝon sangmakulitan.* Sinjoro Jesuo, donu al mi la kor-impresemon pri la bezonoj kaj suferoj, kaj instruu

min helpi al aliaj; ankaŭ mi fariĝu kompatema kiel Vi estas kompatema.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Sepa Stacio: **Jesuo falas la duan fojon**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.

K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La Savanto perdas la fortojn – tiom granda estas la pezo de la kruco kaj de niaj pekoj, al kiuj malgraŭ la promesoj de plibonigo ni ĉiam revenas.* Sinjoro Jesuo, helpu al mi respekti la promesojn, kiujn mi faris dum la konfeso kaj ne reveni al faritaj eraroj.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Oka Stacio: **Jesuo admonas la plorantajn virinojn**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.

K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La Savanto, pasante preter la kompatantaj Lin virinoj, diris, ke ili ploru ne pri Li, sed pri siaj pekemaj infanoj.* Sinjoro Jesuo, pardonu al mi la kulpojn, per kiuj mi malĝojigas kaj ofendas miajn proksimulojn; mi decidas plibonigon: mi volas ekhelpi ilin kaj ĉiam montri bonvolemon.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Naŭa Stacio: **Jesuo falas la trian fojon**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.

K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*Nia indiferento en Diservo: forlasado de preĝoj, de Sanktaj Mesoj, neglektado de sakramentoj, faris al la Savanto la suferon de la tria falo sub la kruco.* Sinjoro Jesuo, defendu min kontraŭ la spirita pigreco. Helpu min, ke mi neniam forlasadu la matenan kaj vesperan

preĝon, la Sanktajn Mesojn dimanĉe kaj festotage; ke mi ofte profitu el la sanktigaj rimedoj kiuj estas la sakramentoj. Mi ne volas disipi la fruktojn de Via savodona verko.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Deka Stacio: **Jesuo senigita je vestoj**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*Post aliro al Golgoto, oni deŝiris de la Savanto la vestojn. Li suferas por la homaj senpudoraj pensoj, vortoj kaj agoj.* Sinjoro Jesuo, gardu min kontraŭ la pek-okazoj kaj helpu al mi konservi la puran koron. Al tiaj apartenas la Regno de la ĉielo!

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Dek-unua Stacio: **Jesuo estas krucumata**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La sanktegaj manoj kaj piedoj de la Savanto estas albatitaj per feraj najloj al la kruco. Jesuo prezentas oferon por niaj pekoj.* Sinjoro Jesuo, igu ke mi bonfaru al ĉiuj, senkonsidere pri tio, kiuj ili estas, kaj ke mi observu la ordonojn de Dio kaj de la Eklezio. Mi volas tiel procedi pro la amo al Vi kaj al Via Patrino.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Dek-dua Stacio: **Jesuo mortas sur la kruco**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La Savanto, volante repacigi nin kun Dio kaj restitui al ni la gracon, oferis sian vivon.* Mi dankas al Vi, Sinjoro Jesuo, ke per Via

morto Vi donis al ni la savon. Mi deziras vivi en la stato de graco kaj neniam ĝin perdi pro peko.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Dek-tria Stacio: **Jesuo estas forprenata de la kruco**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La sanktega Patrino alpremas al koro la mortan Korpon de sia Filo.* Patrino de Dio! Sinjoro Jesuo sur la kruco donis al mi Vin kiel Patrinon. Mi estas Via infano. Ne forlasu min sed gvidu al Dio.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

Dek-kvara Stacio: **Jesuo estas entombigata**

S: Ni adoras Vin, Sinjoro Jesuo Kristo, kaj laŭdas Vin.
K: Ĉar Vi savis la mondon per Via kruco kaj pasiono.

*La Apostoloj metis la plej sanktan Korpon en la tombon. La trian tagon Sinjoro Jesuo resurektis.* Sinjoro Jesuo, Vi estas mia Vivo, Vojo kaj Vero. Mi kredas je Vi kaj volas tiel vivi, kiel Vi instruas min en ĉiu Sankta Meso.

*Patro nia..., Saluton, Maria....*

*Kiu por ni portis vundojn, * Jesu Kristo, estu kompatema.*

## Fino

Sinjoro Jesuo, mi oferas ĉi tiun Krucvojon por honori Vian suferadon kaj glori la Sanktegan Patrinon. Mi scias, ke Via ofero ripetiĝas en la Meso, kiun mi klopodos ĉiam pli bone ekkonadi kaj konscie en ĝi partopreni. Amen.

*Verkis pas. Stanislavo Chabiński SAC*
*Esperantigis SP*

# Mi timas la morton

Estimata Sinjorino!

Vi skribas al mi ke vi timas la morton. Mi ne scias, ĉu tio estos por vi konsolo, se mi diros, ke mi ankaŭ timas ĝin. Tamen mi pensas, ke la timo antaŭ la morto estas io natura. Ĉiu morto havas en si ion el disŝiro, kaj ĉiu disŝiro doloras – estas sufero. La animo forlasas la korpon. Familianoj forlasas samfamilianojn. Kaj krom tio la morto starigas nin fronte al la demando: kio plu? Kio poste?, eĉ se ni kredas je la vivo eterna. Estas ja la afero de juĝo kaj kvitigo de la kontoj pri tio, kiel oni travivis la vivon.

Mi pensas ankaŭ, ke nian timon antaŭ la morto ankoraŭ pliprofundigas la Evangelia priskribo de la lasta tago. La priskribo estas plena je hororo. Kristo transdonante la dramaturgion de la lasta tago diris al ni, ke tio estos decida afero por la homo. Ĉar tiam, post transpaŝo de la limo de vivo kaj morto, findecidiĝos lia sorto. Kia estos ĉi tiu sorto? La vivo en eterna lumo aŭ eble ...

Vi demandas, kio estos tiu nia lasta tago? Certe ĝi estos tago, en kiu finiĝos la rolo de la tempo kaj de la portempaj valoroj. Estos la tago de konfrontado de la Diaj intencoj kaj plenumoj de la homo. Tiam Dio postulos de ni la kalkulon pri niaj talentoj kaj kapabloj, pri la disipitaj ŝancoj kaj donitaj eblecoj.

Certe tio estos profunda konscio kaj pritakso de si mem. Kio oni estas kaj kio oni povus esti. Ĉi tiu momento estos tre malfacila kaj hontiga. Escepte se Dio ankoraŭfoje montros al ni sian mizerikordon.

Certe tio estos la definitiva elekto bonon kaj malbonon. Dion aŭ ne-Dion. Elekto, de kiu jam ne estos abĵuro.

Antaŭ ĉio tamen ĝi estos renkontiĝo kun la Homa Filo – Jesuo Kristo. Renkontiĝo neevitebla, renkontiĝo, kiun multaj homoj preferus ne travivi, renkontiĝo drama, definitiva kaj eble disiĝo for de Li por ĉiam ...

Por aliaj la renkontiĝo kun la Filo de la homo estos pratempa plenumiĝo de la homaj sopiroj al la feliĉo, kiun jam nenio forprenos kaj ekŝancelos. Al la plej profunda justeco. Al la Vero, kiun multaj homoj serĉis en tenebro kaj kun plena abnegacio, kiu kostis al ili multe da peno, da tempo, kaj eble eĉ da larmoj. Estos la renkontiĝo kun la Amo, kiun ni serĉadis en la vivo kaj ne povis trovi, kaj disde kiu nun neniu disigos nin, nek doloro, nek nudeco, ĉar ĉi tio jam ne estos. Por multaj homoj la morto estos pleneco de la vivo, kiu neniam finiĝos. Estos aliro al fino, ripozo, kunmeto de lacaj manoj. Estos paco, tiel ofte dezirata paco.

El la perspektivo de tiel komprenata la lasta tago oni devas ekrigardi sur nian vivon, sur la hodiaŭan tagon. Eble vi diros, kiucele pri tio pensi, kiucele pri tio paroli? En la vivo estas tiom multe da suferoj kaj afliktoj. Mi respondas. La lasta tago estas strikte ligita kun la hodiaŭa tago. Ĉu ni volas, aŭ ne, ĉu nia vivo estas facila, aŭ malfacila, la lasta tago jam komenciĝis. Nome la lasta tago por ĉiu el ni komenciĝas tiam, kiam ni komencas distingi bonon disde malbono. Kaj hodiaŭ, farante bonon aŭ malbonon, ni efektivigas la finfinajn elektojn. Tial nekutima graveco de la nuna momento de mia vivo kaj decida signifo de mia hodiaŭa sinteno.

Krom tio, se homo havas en sia memoro la fakton, ke la morto estas neevitebla, li komencas pli bone vidi proporciojn. Kaj ĉi tie tute ne temas pri tio, ke malgrandiĝu nia engaĝiĝo en la teraferoj. Ne! Ne endas rezigni pri diversaj niaj ambicioj profesiaj kaj sociaj, oni devas nur vidi proporciojn, kiuj tiel facile perdeblas.

Do ĉi tiuj rimarkoj estu por vi memorigo, ke ni estas enigitaj en la ritmon de forpasado, ke la tero ne estas patrolando de homoj, ke la mortosojlo estas ĉiam antaŭ ni. La memoro pri la morto stimulu mediti pri la vojo, kiun ni iras, kaj pri la fino, al kiu ni strebas. Ĉar *estas dekretite por homoj unufoje morti* kaj ĉi tiu fakto havas sian parolivon. Neripeteblan parolivon.

Kun la rezervo, ke la morto de la kredanto, malgraŭ ke estas ankaŭ sufero, posedas optimisman akcenton. *Vita mutatur, non tollitur* – la vivo aliiĝas, ne perdiĝas. Kaj kvankam ni estas plenaj de timo, tamen ni akceptas trankvile same la timon kiel ankaŭ la suferon, kredante je la vivo eterna promesita al ni fare de Kristo.

Mi deziras al vi fidon kaj trankvilon –

*pas. Johano*

---

# Kompensa diservo

*La unuaj sabatoj de monato*

## Kondiĉoj de la diservo

Dum 5 monatoj en la unuaj sabatoj de monato – kun la intenco de kontentigo por la pekoj plenumitaj kontraŭ la Senmakula Koro de Maria – oni devas:

- iri por konfeso (esti en la stato de sanktiga graco),
- komuniiĝi,
- trapreĝi parton de la Rozario, laŭplaĉe elektitan,
- dum 15 minutoj konsideri unun rozarian misteron aŭ kelkajn misterojn.

Al tiuj, kiuj akceptos ĉi tiun diservon, Maria promesis, ke ŝi ĉeestos en la horo de ilia morto, kun ĉiuj gracoj bezonaj por ilia saviĝo.

---

**Ho Maria,**
**senpeke koncipita,**
**preĝu por ni,**
**kiuj serĉas helpon ĉe Vi,**
**kaj por ĉiuj,**
**kiuj ne serĉas helpon ĉe Vi,**
**kaj precipe por malamikoj**
**de la sankta Eklezio**
**kaj al Vi rekomendataj.**
**Amen.**



---

# La pasiono kaj la resurekto de Kristo, motivo de la neskuebla espero

Ni klopodas konsideri la misteron de la Dia mizerikordo en la Malnova kaj la Nova Testamento, ĉar ĝi vekas kaj disvolvas en ni la sintenon de fido. Se ni demandos, kiun plej grandan donacon ni povas oferi al iu, kiu estas al ni nekutime proksima, kiun ni pleje estimas, do estas ĝi propra vivo. Dio-Homo donis al ni ĝuste tiun donacon. Al Li ne sufiĉis, ke Li fariĝis homo kaj akceptis la duran sorton de homa vivo kun ĉio, kion ĝi portas, sed krome Li foroferis ĝin por ni.

Kristo ne okupis ian privilegiitan pozicion en la surtera vivo. Li vivis kiel aliaj, malgraŭ tuta sia senfina grandeco, kiun havas Li kiel Dio. Li faris sian vivon plene homa, simila al nia en ĉio escepte de peko – kiel skribas la Apostolo. Jam ĉe la profetoj ni renkontas anoncojn dirantaj pri tio, ke la vivo de Mesio estos signita per ofero, per granda ofero de vivo.

Kristo estis kruele torturata, mortis, oni trapikis Lian flankon kaj metis en la tombon. Sankta Paŭlo skribas: *Kiu amis min kaj donis sian vivon por mi* (Gal 2,20). Tion ĉi povas diri ĉiu homo. Ni devas konscii, ke suferis Dio-Homo kaj ke tiu pasiono kaj morto de Kristo ĉeestas inter ni, aktualiĝante precipe en la momento de Eŭkaristio. Tiam inter ni aperas Kristo kiel viktimo kaj sur altaro mortas por ni je maniero sen elverŝo de sango. Kion pli ni povus atendi de Dio? Li mem en povus doni pli. Eĉ Dio en la homeco de Kristo aliris al siaj definitivaj limoj. Li sin mem donis al ni kaj sin donas al ni plue, sin oferante sur niaj altaroj, samtempe transformante sin en nutraĵon por ni. Pano iĝas Li mem kaj nia nutraĵo. Al neniu homo venus en la kapon, por ion tian elpensi. Li dirus: tio estas blasfemo. Tamen Dio transpaŝis la limojn de homa maleblo. Ĉu tio ne devigas ĉiun el ni por konfidi al Li ĝis-ekstreme? Li, kiu ĉion donis al ni kaj senĉese donas, jam ne povas doni pli, donante sin mem, eĉ Li – Dio. De nun tuta nia vivo estas plena de Kristo, estas mergita en Li: Li absolvas nin de niaj pekoj, pridonacas nin per la graco, donas al ni la Sanktan Spiriton, donas al ni kiel nutraĵon sian Korpon kaj sian Sangon.

La dua parto de la paska mistero – estas la resurekto de Kristo. *Krucumita, mortinta kaj entombigita, la trian tagon Li releviĝis* (Kredo-Konfeso). En nia konsiderado ni aliĝu al la disĉiploj irantaj al vilaĝo nomata Emaus, pri kiuj skribas s-ta Luko. Kristo aliĝis al ili kaj ligante al Skriboj, klarigantis, ke la Mesio devis suferi ĉion tion, por tiel eniri en la gloron de la Patro. Kiam la disĉiploj aŭskultis ĉi tion – iliaj koroj brulis. En tiel mallonga tempo denove kreiĝis en iliaj animoj nova, profunda kredago. Kristo resurektis. Nia espero ne mortis sur la kruco, ne estiĝis por ĉiam entombigita. La tombo malfermiĝis, Kristo reviviĝis, kaj kio ŝajnis esti malvenko, tio fariĝis granda espero por la homoj. Ni konas la pluan historion de Kristo surtere, Liajn renkontiĝojn kun la disĉiploj, la dialogon kun Petro pentoplena kaj konfesanta sian amon: *Sinjoro, Vi scias ĉion; Vi scias, ke mi amas Vin* (Joh 21,17). Li resurektis, por vivi kun ni. Li denove iĝas nia granda espero, malfermanta la iradon al estonteco, ĉar Li supreniris al la ĉielo.

Tamen se ni volas releviĝi kun Kristo, do ni devas, en ĉi tiu surtera vivo signita per krucoj, konfidi al Kristo. Li vere estas nia granda espero. Ni povas tiri por ni mem certan konkludon: se ni estas surkruce – ni estas kun Kristo, se ni ne komprenas kial Dio tiel procedas pri ni – ni estas kun Kristo, tamen se ŝajnas al ni, ke tiu tuta mondo, kiu ĉirkaŭas nin, estas malbona mondo de Dio – ni sekvas la voĉon de satano, ĉar Kristo mortis por tiu tuta mondo, ankaŭ por tiuj plej malbonaj, kiujn foje jam ĉi tie ni malaprobas kaj plej volonte ni kondamnus ilin al infero. Por ili ĉiuj Kristo mortis, pagis la prezon de sia sango.

Post la resurekto kaj ĉieleniro de Kristo, tra la naskiĝanta kaj disvolviĝanta Eklezio iras granda espero pri resurekto kaj ĉieleniro, naskiĝanta sur la kruco de nia vivo. Se Kristo resurektis do ankaŭ ni resurektos. Se aperas kruco, se renkontas nin plej diversaj spertoj, ni devas diri al ni, ke tio estas normala. Kial? Ĉar Kristo amas nin kaj volas ke ni estu proksime al Li kaj dividu kun Li nian vivon. Kaj se en nia vivo mankas kruco, do ni devus miri kaj eĉ iom zorgi, kaj prefere demandi al ni: ĉu en nia vivo estas Kristo? Eble en nia vivo mankas Kristo tial, ke ni evitas la krucon, ni serĉas, ŝajnus, la honestan sed ne Kristan vojon. Do la kruco en nia vivo estas fonto de fido,

kaj ne tiu de malfido. Se en nian vivon eniras la kruco, do ne estas dubo, ke en nian vivon eniras Kristo, Tiu kiu mortis, sed ja resurektis. La sperto pri kruco por ĉiu el ni povas esti granda momento de renkontiĝo kun la mizerikorda amo de Kristo. En ĉi tiu amo ni resurektos, kiel ankaŭ Li resurektis, ĉar ni ne ekzitas sen Li. Kaj kun ĉi tiu amo ni supreniros tien, kiel Li supreniris – al domo de la Patro. Ĉar ni kredas je la releviĝo de la mortintoj kaj je la vivo eterna.

Tiel parolas al ni la pasiono kaj resurekto de Kristo, iĝante la motivo de neskuebla fido. Ni devas senĉese ĝisfunde esplori ĉi tiujn verojn, ĉeestigi ilin en nia vivo, konsideri ilin precipe tiam, kiam ĉio ŝajnas malsukcesi, ne nur en nia koro kaj ĉirkaŭe de ni, sed ankaŭ en la tuta mondo. La bildo de ĉi tiu mondo aspektas ne pli bone ol en la tempo de Kristo, kaj eble eĉ pli malbone. Homoj forlasas Kriston, foriras de graco, disvastiĝas malbono, sed en ĉi tiu malbona mondo daŭre staras la kruco de Kristo, tiu kruco kiu diras, kion ni devas fari: krucumi nin mem kaj oferi nin mem fordonante nin en la manojn de Tiu, kiu ĝis-ekstreme amis nin, - Jesuo Kristo, kiu estis krucumita, mortis kaj resurektis. Li estas nia granda espero, kiu alparolas nin de la kruco kaj post la resurekto. Li estos granda espero en la momento de nia morto. Akceptos nin Tiu, kiu por ni estis krucumita, por ni resurektis kaj eksidis dekstre de la Patro por propeti por ni, kaj volas doni al ni partoprenon en sia gloro.

*Pas. Johano Popiel SI*

(Or. Mił. 43, 12; tr. SP)

---

**„Samtempe amu kaj suferu, esperu kaj meditu!**

**Ho ve! Malfeliĉa estas tiu, kiu amas nur korpojn, formojn kaj aspektojn. La morto prenos ĉion. Penu ami la hom-animojn, ĉar vi retrovos ilin!"** *Victor Hugo*

* * *

**Ni bezonas homojn laŭmezure de Francisko el Asizo – malriĉan, dian homon, senigitan je nesalubra ambicio kaj ĉiaj pretendoj. Homon plenan je simpleco kaj saniga forto de malriĉeco. Etan fraton, plenan je ĝojo kaj turniĝantan al ĉiu kun amo senlima.**

*Phil Bosmans*

---

# Fidela al la idealoj de Sankta Francisko



La Dia Servanto Alojzo Kosiba naskiĝis la 29an de junio 1855 en Libuŝa. Samtage li estis baptita kaj ricevis la nomon Petro. Dudek-tri jarojn aĝa, li aliĝis al franciskanoj en Jaroslavo (sudorienta parto de Pollando). En la klostro en Wieliczka li travivis 60 jarojn kiel ordena frato kvestisto kaj almozdonisto.

Fidela al la idealoj de Sankta Francisko el Asizo, li iĝis la bildo de la mizerikorda amo de Dio Patro, servante al la plej malriĉaj kaj kun tenero kliniĝante super ĉiu homa mizero materia kaj spirita. La granda honoranto de Maria la Dipatrino Milda, li "kondukis" infanojn sub Ŝian patroninan mantelon. Al la Senmakula li estis konfidanta ankaŭ la infanojn ankoraŭ nenaskitajn, pro tio la gravedaj patrinoj tre ofte alvenadis peti lin pri la preĝo por feliĉa akuŝo. Male, la pliaĝulojn li "kondukis" al la Mizerikorda Jesuo en kapelo estanta lia ŝatata loko de preĝado.

Frato Alojzo mortis la 4an de januaro 1939 en la klostro en Wieliczka. Liaj mortrestaĵoj troviĝas hodiaŭ en la kapelo de la Dipatrino Milda. La proceso por beatiga proklamo komenciĝis en la jaro 1963. Nuntempe la afero disvolviĝas en la Kongregacio por Sanktul-procesoj en Vatikano.

Senĉese daŭras la preĝado por baldaŭa beatigo de la Dia Servanto Frato Alojzo, precipe en la preĝejoj de nia franciskana provinco de la Dipatrino de la Anĝeloj. Jam tradicie tiu preĝado en la solena maniero okazadas dimanĉe post la 4a de januaro.

*P. Ludwik Kurowski ofm*

*(Źródło 6/2003, IV; tr. SP)*

# Preĝo por la beatproklamo de la Diservanto Frato Alojzo Kosiba

Ĉiopova, eterna Dio, * degnu per levo al la gloro de la altaro * famigi Vian Servanton Fraton Alojzon, * kiu dum tuta sia vivo adoris Vin * per senĉesa preĝo, * per fervore plenumataj devoj * kaj per aktiva amo al la plej malriĉaj. * Havigu al ni pro lia propeto la gracon..., * kiun humile ni petas * per nia Sinjoro Jesuo Kristo. * Amen.

---

# SEKCIO ESPERANTO de KIK en Krakovo

## ekzistas kaj agas...

Ekde la 10a de oktobro 2002, la SEKCIO ESPERANTO en Klubo de Intelektularo Katolika (KIK) ĉe strato Sienna 5 en Krakovo – komencis novan etapon de sia aktivado. Danke al granda fervoro de *Jadviga Gibczyńska*, kiu gvidas la Sekcion, la kunvenoj de sekcianoj okazas regule la duan ĵaŭdon de ĉiu monato je la horo 15.00.

La agado konsistas ĉefe en regula studado de la papa verko *Transpaŝi la sojlon de l' espero*–ĉapitron post ĉapitro, sub la paŝtista zorgo de patro *Stanisław Płachta*. Poste estas diskutado pri la tuŝita temo, priparolo de aktualaĵoj en Esperantujo, eltrinko de teo kun bongusta kuko kaj ... ĝis la venonta kunveno.

La sinsekvaj temoj estos jenaj:

| | | |
|---|---|---|
| „Sed kial Dio kaŝas sin?" | – 13a de marto | h. 15.00 |
| „Ĉu Jesuo estas vere la Filo de Dio? | – 10a de aprilo | h. 15.00 |
| „Dio, kiu savas." | – 8a de majo | h. 15.00 |

Tekston de la Papo kun propra komentario esperantlingve kaj pole prezentos patro *Stanisław Płachta OFM.*

Ĉio daŭras du horojn (15-17) en bona etoso.

Elkore invitas la sekci-estrino
*Jadviga Gibczyńska*

---

*Zofia Kamieniecka*

# Antaŭ la hejmfenestro

Ora aŭtuno en la sun' brilas
antaŭ la hejmfenestro.
Kaj miaj okuloj admiras
ensune brilantan veston.

La arboj kaj ankaŭ gazono
belege, impone vestitaj,
en kolor' flava kaj en oro;
la ĉiel' lazure kovrita.

Kaj kvankam stratbruo proksime,
grandega homrapidemo,
la silent' kaj kvieto anime
min disigas de l' urbaj problemoj.

Kreiĝas en mia koro
la kant' ĉieltuŝanta –
pri l' bela temp' rememoroj –
mia anim' diskantanta...

Disĵetu mi inter homojn
pri l' belec' la rememorpecojn,
por ke la hom' fariĝu pli bona –
ekkonu, ekamu la belecon...



---

**Ĉi-jara pilgrimo de la krakovaj katolikaj esperantistoj**
al la tombo de Sankta Faŭstina
en la Sanktejo de la Dia Mizerikordo
en Krakovo-Łagiewniki
okazos
**dimanĉe la 29an de junio 2003.**

La pilgrimo komenciĝos sabate, 28an de junio,
per la esperanta Meso celebrota je la horo 16.00
en kapelo ĉe la preĝejo al Sankta Stefano
(str. Sienkiewicza 19).

La pilgrimon tradicie organizas kaj informas pri ĝi:

*Franciszka Bardecka*, Litewska 24/2,
30-014 Kraków, tel. (012) 632-47-79.

---

# Danko

Dio,
mi multe suferis
kaj suferas,
pro pekoj,
Kiujn mi ne faris,
pro la bono,
kiun mi volis
fari!
"Dio! –
mi diris –
Mi ne meritas
ĉi tiun kalvarion,
sed se Vi donas
al mi la manon,
mi estos forta
por ne lasi
min venki
de la malespero
Kaj mi restos
fidela al Vi".

Dio,
mi multe ĝojis,
mi estas feliĉa
ĝis la larmoj.
„Dio! –
mi diris –
Nenion mi faris
Por meriti
ĉi tiun paradizon.
Kiel danki al Vi
kaj al miaj
Katalunaj
geamikoj
por la bono,
kiun mi ricevis?

Dio,
faru al mi la gracon
de ne forgeso!

Dio,
mi dankas al Vi
ankaŭ pro la doloro,
ĉar la doloro
ebligas al mi
kompreni
la riĉaĵojn,
kiujn mi ricevis
de Vi".

## Burĝono

La pizo
burĝonis je
tri folioj.
Baldaŭ aperos
delikata
floreto.
Ĉirkaŭe estas
mola kovraĵo
de verdo
kaj aromoj.

## Frato

Frato,
oni parolis al mi pri vi
kaj mi serĉis vin;
Mi komprenis
vian malriĉecon
kaj mi ekamis vin.
Vi havas plurajn nomojn,
kiujn mi ŝatas rememori,
kiujn mi ne volas forgesi:
Jozefo, Arturo, Sebastiano.
Via haŭto estas pli
ol ununura koloro,
via haŭto
estas flava, nigra, blanka.
Via vizaĝo eĉ se laca
kaj plej suferanta,
estas bela,
ĉar mi amas vin.

Frato,
ĉi tiun nokton via kovrilo
estis kartonfolioj,
kiuj ŝirmis el malvarmo
vian korpon malsatan,
via kuŝejo estis la strato
Eluzita
pro miloj da paŝoj.
Al vi venu tiuj paŝoj,
povu aliaj homoj
premi vian manon kaj vin savi
de via kalvario.

Frato,
Mi vidas Kriston en vi!

## Sensumo de printempo

En la aero parfumo
de mento.
Rozaj persikoj
kaj helaj
migdaloj
etendas
la brakojn
florantajn
kaj rigardas
la ĉielon
et-opalan
mirigite pro tioma
beleco.

## Ĉiutage

Ĉiutage mi devas
vidi eĉ banalajn
ne interesajn
vizaĝojn,
kaj ne vidi la vian.


Ĉiuhore mi devas
aŭdi eĉ malagrablajn,
enuigantajn
voĉojn,
kaj ne aŭdi la vian.
Ankaŭ tio estas
doloro.

## Al Pastro Henriko Paruzel

Vi ne plu povas agi,
eble vi tion
ne emas,
ĉar vi kuŝas
silente
Sub la tero
kaj ne rigardas,
kio en la mondo
okazas.
Vi ne plu povas agi,
ĉar via korpo
mortis.
Ĉu povas animo
sen korpo batali?
Ĉu povas animo
Sen korpo deziri?
Se tio eblas,
Sciu, ke ĉio el mi
estas la via,
miaj sopiroj ankaŭ!
Inspiru min,
instigu min,
subtenu min!
Mi batalos
por vi!

## La danco de l'arboj

La suno brilegas
sur akvo
de eta
kaj vigla
rivero.
Dancas arboj
de persikoj,
migdaloj
kaj piroj.
Ili havas vestojn
blankajn
kaj koloron
de la rozoj,
kun verdaj brodaĵoj
kaj makuloj
de lumo
orumita.



---

## *Memoru – finarangû!!!*

☛ Ĉu vi renovigis la abonon al FRATECO por la jaro 2003!?

---

# La hundeto Mikuś

Vekiĝis tago. La unuaj sunradioj rigardas tra fenestro. Malkuraĝe ili kisas murojn de la ĉambro. Ili tuŝas la vizaĝon de Joĉjo. Li malfermas okulojn. Apud lia lito staras hundo.

– Vekiĝu, parolas ĝiaj brilantaj okuloj.

– Ellitiĝu, ŝajnas diri Mikuś kaj metas la piedon sur la liton lekante samtempe manon de Joĉjo. Ĝi atendas, malpacience rigardas.

Kion fari? Joĉjo malrapide ellitiĝas kaj komencas vesti sin. La hundeto dancas, saltas, deziras helpi. Ĝi ne povas elteni kaj longe atendi, ĝiaj okuloj rigardas.

Joĉjo prenas ŝlosilon kaj kun hundamiko Mikuś forlasas hejmon. Estas frua mateno. Sennuba ĉielo. Belega vetero. Bonodoras la siringoj. Kelkaj birdoj sur la tegmento komencas kanti serenadon.

Amikoj direktas sin al la herbejo. Ili trairas stratojn, mallongajn vojojn. La hundeto rapide kuras. Joĉjo malrapide trotas. Baldaŭ ili atingas la celon, la verdan herbejon. Apude fluas rivereto. Estas videbla malgranda arbareto. Mikuś haltis. Rigardas. Kio okazas? Jen elsaltas kelkaj leporoj. La hundo rapide komencas kuri. Baldaŭ ĝi malaperas.

Joĉjo staras, atendas, nenion li vidas. Li proksimiĝas al la rivereto. Akvo zumas maltrankvile. Flugas malgrandaj muŝoj. Kliniĝas granda arbo. Sur la floro sidas abelo. Apude estas videbla diverskolora papilio. Suno leviĝas sur la brakoj de la ĉielo kaj ĵetas ĉiam pli fortajn radiojn sur la teron. Sed Mikuś ne revenas. Joĉjo maltrankvile atendas. Kiel longe ankoraŭ? Baldaŭ estos tagmezo. Oni devas reveni hejmen. Bedaŭrinde. Li larĝe malfermas la okulojn. Jen videblas iu malgranda punkto. Ĝi proksimiĝas. Malrapide. Videbla jam estas la tuta hundo. Jam ĝi estas. Ĝi iras kaj preskaŭ ploras. Kio okazis? Bedaŭrinde. Ne nur ne sukcesis kapti la leporon, sed io malbona okazis al Mikuś, kiu lamas kaj hurletas. Joĉjo kaj Mikuś kun malĝojo revenas hejmen. Hejme la hundo multe trinkas akvon kaj poste lekas piedon. Tiel finiĝis la matena promenado.

*Bogusław Sobol*

# Ciganineto Veska

Mi estis juna fakestro en distrikta administracio, kiam mi eksciis ke ĉe ni estas nova juna oficistino, ĵus diplomita en proksima urbo. Sekvamatene, post delikata frapo sur la pordo, enĉambriĝis ĉarma, altstatura, brunvizaĝa belulino, kun apenaŭ rimarkebla rideto. Ŝi salutis, manpremis kaj diris, ke ŝi estas Veska, la nova oficistino.

Mi ekrigardis, rigardadis, okulesploris ŝin, de la frizaĵo ĝis la piedoj. Vere, belulino! Ŝi ŝajnis perfekta pentraĵo de mondfama renesanca pentristo. Mi proponis al ŝi sidiĝi kontraŭ mia skribotablo, por iomete konatiĝi. Tiam ŝi parolis pri studado, pri sia oficrutino, sed nek vorton ŝi uzis por mencii siajn gepatrojn. Tuj, samtage, ŝi komencis plenumi siajn oficajn devojn. Post unu semajno mi denove demandis ŝin pri ŝiaj deveno kaj familio. Ŝi ege suspiris: *"Ĉu vi disponas duonhoron por aŭskulti min? Sed mi petas vin gardi sekreton, ĉar tion scias nur kelkaj samurbanoj. Pro tio mi preferas labori en via urbo, pli malproksime de homaj klaĉoj"*. Mi promesis gardi sekreton, post kio ŝi daŭrigis:

*„Antaŭ pli ol dudek jaroj nian urbon vizitis migranta cirko kun belega, bonstata hungara ciganino, kantistino. Oni parolas, ke plimulto da urbanoj vizitis la cirkon por nun rigardi kaj aŭskulti la ĉarman kantistinon. Kiel kontrolanto de enirbiletoj estis Oĉjo Ivan, kiu akceptis kiel luantinon en sia domo la ĉarman ciganan kantistinon. Pri amaj aventuroj de la kantistino sciis Oĉjo Ivan. Ŝi kontaktis nur kun belega juna viro, kiu prezentis sin kiel oficisto en urba banko. Post semajno la cirko forveturis al alia urbo. Ĉu poste daŭris la kontaktoj kun la bankoficisto? Neniu scias.*

*Post kelkaj monatoj, la kantistino montriĝis denove en la urbo por serĉi sian eksamanton, ĉar ŝi estis graveda. Bedaŭrinde, tia homo ne ekzistis en banka personaro. Troviĝante en situacio senelira, ŝi naskis en la domo de Oĉjo Ivan, lasis la bebon kaj nokte foriris al nekonata direkto. Oĉjo Ivan informis la urbestraron, registris la naskiĝon, deklaris ke li estas la patro de la bebo kaj nomis ĝin Veska. Tiu bebo estas mi, kiu sidas antaŭ vi"*.

Mi tre atente, senvorte aŭskultis tiun sinceran kortuŝan konfeson kaj penis enrigardi la animon, la koron de tiu junulino, kiu estas ĉagrenita de la vivo, eĉ ekde la naskiĝo. Mi promesis kaj gardis la sekreton pri ŝia socia deveno. Tiamaniere ni estis ne nur kolegoj, sed veraj amikoj.

La vivo ĵetis nin al diversaj regionoj, al diversaj urboj. Pli poste mi renkontis ŝin denove. Ŝi rakontis pri edziniĝo kun bonega viro, ke ŝi jam atendas ĉarman idon.

La jaroj forpasis nerimarkeble, mi preskaŭ forgesis Veskan kaj ŝian enigman devenon, ĉar krom la oficejajn devojn mi havis proprajn vivproblemojn ĝis pensiuliĝo.

Foje, sur ĉefa strato de mia urbo, mi vidis mezaĝan virinon kun junulino. Ŝia vizaĝo esprimis mienon de eksa belulino, malgraŭ preskaŭ blankaj haroj. Paralele kun ŝi marŝis gracia, svelta junulino, kiu leĝere kliniĝante al pliaĝulino ridete rakontis pri io. „Verŝajne patrino kaj ŝia filino" – mi ekpensis. Ju pli mi alproksimiĝadis, des pli ŝia rigardo direktiĝis al mi. Tio instigis min detale rigardadi ilin. Subite la paro haltis antaŭ mi. La pliaĝa denove okulesploris min kaj demandis: *„Vere, ĉu vi estas sinjoro Minĉev?"*. *„Jes* – mi respondis – *estas mi"*. Ŝi ĉirkaŭprenis min. La junulino ege surprizita staris flanke, mirplena rigardis nian ĉirkaŭprenon. Sendube ŝi estis Veska, kiu diris al mi, ke la junulino estas ŝia filino, universitata studentino en nia urbo.

Certe nia nekutima renkonto kaj ĉirkaŭpreno mirigis la studentinon. Veska kvietigis ŝin dirante:

*„Trankviliĝu, filino mia! Vere alvenis la tempo, kiam vi devas ekscii plene pri mia kora sekreto. Sinjoro Minĉev scias pri mi pli ol vi. Nun mi proponas viziti Universitaton, plenumi viajn taskojn; poste mi rakontos al vi ĉion, dekomence ĝisfine".*

Post la adiaŭo ili daŭrigis sian vojon. Mi staris sur la strato, rigardis sur la dorson de la patrino kaj filino, kiuj tenis sin reciproke je la manoj, verŝajne kortuŝitaj. Kiamaniere la patrino klarigos? Kiamaniere la filino akceptos tian strangan okazintaĵon, tiun sekreton, garditan en la plej profunda anguleto de la patrino koro? Tre longe mi meditis pri la homa sorto, sed mi ne povis al mi klarigi, kiu anticipe decidas kaj tutvive direktas ĝin.?

Neklarigebla enigmo, sed eterna vero estas, ke sub la ĉielo troviĝas loko por ĉiuj, sendepende de ilia deveno aŭ gento.

*Ivan Trifonov Minĉev*

---

# Mia filo

En la brakojn mi neniam filon prenas.
La nomon, voĉon, pulson ricevos li neniam.
Trankvila, ĉe lia lito mi ne tremas.
Por mi filo estas nur revo por ĉiam!

Se li venos, kiel febla stipo printempe,
Etendos du siajn varmajn manetojn.
Mi ĝojege ĉirkaŭprenos lin ĝustatempe
Kaj montros al li sunon, florojn, ventetojn.

Kaj ĉiun vesperon, lian hirtan kapeton
Mi mallevos, enlitigos por ke li dormu.
En lia sonĝo transflugos birdeto.
Mi kredas, ke bonan, noblan homon mi plenformu!

Mi ne havas, neniam havos filon!
Mia koro suferas, vokas idon atenditan.
Ŝajnas al mi aŭdi lian voĉon – sonbrilo.
Patran zorgon al vi, mia filo ne naskita.

*Ivan Trifonov Minĉev*

---

# † La dua preĝtago de esperantistoj

Krakovaj esperantistoj elkore invitas partopreni
**Sanktan Meson en Esperanto**
en kapelo ĉe la preĝejo al Sankta Stefano (str. Sienkiewicza 19)
**la duan dimanĉon de ĉiu monato, je la horo 16.00**.

La datoj de sinsekvaj E-Mesoj estos:
9an de marto, 13an de aprilo, 11an de majo.
La Meson celebros patro *Stanisław Plachta ofm.*

---

**LA BONO KIUN VI FARAS HODIAŬ
ESTOS FORGESITA MORGAŬ,
SED FARU BONON – KIO AJN ESTIĜAS.**

*(Surmura surskribo en Ŝuŝu Bana, domo por infanoj en Kalkuto, kreita de Patrino Tereza)*

# Vero konfirmata de la vivo

En mia naskiĝvilaĝo vivis bonega homo, Baj Vasil. Jam de la infanaĝo li estis orfo. Li elkreskis, helpante siajn proksimulojn en la terkulturado, paŝtante dombestojn. Li loĝis en malnova, modesta dometo. Tute neatendite li ricevis de sia malproksima senida parenco egan heredaĵon, precipe kampojn kaj arbarojn. Li ne estis avarulo, monavidulo; male, li estis animriĉa, kompleza homo. Li vivis por utili al la bezonantoj, ĉar li mem vivis malriĉa, kiel entrudulo en preskaŭ fremda familio.

Se iu konstruas domon, se mortis bovo, ĉevalo de iu vilaĝano, li tuj helpas, ĉar li scias ke vilaĝano-kamparano sen bestoj por labori ne povus ekzisti. Se malsaniĝis malriĉulo, li pagas la kuraciston, la medikamentojn, disdonas al la senkampaj homoj agron por terkulturado, kaj aliajn ĉiaspecajn bonaĵojn.

Li havis filon Kolĉo, prosperan lernanton. Bedaŭrinde, la filo malsaniĝis, paraliziĝis kaj ne plu povis lerni.

Ege ĉagrenita, kiel kompenso, Baj Vasil trovis du lernantojn, duonorfojn, al kiuj li senprofite proponis pagi la studadon ĝis ili ricevos la universitatajn diplomojn laŭ iliaj deziroj. Kiel dankesprimo, ili devas nur iom helpi al la familio, precipe al la invalido se tiu ne resaniĝos.

La orfaj lernantoj ĝoje akceptis lian proponon, uzis lian kelkjaran helpadon (studpago, lernolibroj, vestoj k.s.). Unu fariĝis farmaciisto, la alia – agronomo. Ili foriris al diversaj urboj. Ambaŭ okupis altajn postenojn, akiris domegojn, aŭtojn, bonsalajrojn kaj ili neniam menciis aŭ rememoris sian bonfaranton.

Rezulte de la animdoloroj, zorgoj, tristego, Baj Vasil kaj lia edzino mortis tro junaj. Kolĉo estiĝis orfo kaj devis longjare viveti kun deformita korpo – lamulo kiu apenaŭ povas moviĝi.

Preskaŭ ĉiuj homoj helpataj de la patro ne estas inter la vivantoj. La restaĵo de la iama heredaĵo dum t.n. Stalina periodo estis forprenita aŭ kolĥozigita entute.

Por akiri panon, Kolĉo estis devigita streĉe labori somere kiel ĉambristo, lavi bokalojn, kulerojn, manĝilojn en proksimurba ĝardena restoracio; vintre li restadis hejme sola en malvarma, vilaĝa domo, prizorgata de du najbaraj avinoj.

Iufoje, dum vintro, kiam la tero estis neĝkovrita, la najbaraj avinoj rimarkis, ke de kelkaj tagoj mankas piedsignoj sur la neĝkovritaj ŝtupoj al aŭ de la pordo de la dometo de Kolĉo. Ili proksimiĝis, ekrigardis tra la glaciiĝinta fenestreto kaj tute surpriziĝis – Kolĉo morta, kurbiĝinta sur hejtilo, ŝajne ĉirkaŭprenas patran tombon kaj plendas sian sorton, sian viveton, sian suferadon, sian forĵeton de la homoj.

Samtempe la orfoj, nunaj magistro kaj agronomo, sendube, trankvile bonfartas en propraj agrable varmigitaj urbaj ĉambregoj. Tio refoje atestas, ke vere la feliĉon de unu oni konstruas sur la malfeliĉo de la alia.

Neniu rajtas dubi, ke la konkludo de Patrino Tereza estas vivmotivita. Tion konfirmas la priskribita okazintaĵo.

**Noto:** *Baj* – antaŭnomo: alnomo al pliaĝa viro (turkismo).

*Ivan Tr. Minĉev, Bulgario*

---

# KIAL ONI LERNAS LINGVON?

Oni lernas lingvon, gravan aŭ negravan, kun granda esprimpovo aŭ sen ĝi, altrudeman aŭ ne, simple ĉar ĜI ESTAS NECESA. Kaj lingvo fariĝas necesa, ĉar ĝi estas UZATA.

Jam estas tempo, ke ni konvinkiĝu, ke **nur la enkonduko de Esperanto en la praktikan uzon** en la plej diversaj fakoj de la homa aktivado sur internacia nivelo **povas sukcesigi Esperanton kiel internacian lingvon.**

*T. Sekelj*

---

# Ĉu Eŭropo efektive unuiĝas?

Por ke la Eŭrop-konstruado estu solida,
nepras fundament' de ĝia komunec' spirita:
En kulturo la kristana – foriĝu ĉia malamo,
kaj floru industrio, politiko, sentoj, pensado!

La streta monopolism' nin ne sufokadu,
kaj ĉies propra spirito ĉiujn riĉigadu!
Ĉar la nova Eŭropo des pli forta estos,
ju pli identecon de siaj ŝtatoj ĝi aprezos.
Rigardante la mondon, ni klopodu ĉiam
vidi en ĉiu homo proksimulon nian!

Kaj vere evidentiĝos
kaj leĝe disvastiĝos:
Ke familio – la vivdefendanto
kaj de junularo la edukanto!

Por facila interkompreniĝo komunuma
servu Esperanto, lingvo viva kvankam juna.
Simpla, sed riĉa, ne incitas per arteco,
ĝin parolante vi fartas kiel frato.
Lingvo neŭtrala, de paco kaj amikeco,
Eŭropa terminar', sed far la mond' komprenata!

*Wiesław Tomaszewski*
*E-igis SP*

---

**Nepras substreki, ke ĉefa celo de Esperanto**

**estas nur iĝi komuna komunikilo**

**en plurlingva kaj plurkultura Eŭropa Unio.**

---

# 16a Ekumena Kongreso en Rimini

Multaj gesamideanoj demandis, ĉu ni organizos komunan vojaĝon al la 16a Ekumena Kongreso en Rimini, kiu okazos inter la 30a de aŭgusto kaj 6a de septembro 2003. Jen respondo je tiuj demandoj:

**1. Ni organizos vojaĝon al la kongreso per buso** (nova, moderna 2-jara Setra). Kostoj de tiu vojaĝo egalas al 250,-zł (tiu sumo inkluzivas vojaĝkostojn tien kaj reen, asekuron kaj vojaĝon dumvoje al Padovo, Venecio kaj Maria Zell).

**2.** La kongresa aliĝ-kotizo (ne repagebla):

ĝis la 27.12.2002 – 20 eŭroj aŭ 85,-zł,
ĝis la 25.03.2003 – 30 eŭroj aŭ 125,-zł,
poste, ĝis la 15.06.2003 – 40 eŭroj aŭ 170,-zł.

Tiu aliĝkotizo estas pagenda al:

Janina WERESZKA, ul. Kłodnicka 43/27, 54-217 WROCŁAW,
tel. (071) 351-04-21, retadreso pinio@o2.pl.

La aliĝilon ni petas transsendi al pastro Bernard EICHKORN, Romausring 20, D 78050 Villingen.

**3.** La kongres-kotizo, mempagenda tuj post la alveno al la kongresejo, egalas al 160 eŭroj. Tiu kotizo inkluzivas tranoktadon kaj manĝadon en Rimini dum la tuta kongreso.

**4.** La buso ekveturos el Vroclavo 29.08.2003 ĉirkaŭ la 17a horo, ni trapasos la limpasejon Kudowa-Słone, poste Vienon kaj Padovon kaj atingos sabate la 30an de aŭgusto Rimini ĉirkaŭ tagmezo. Ĝi reveturos sabate 06.09.2003 post la fermo de la ekumena kongreso. Dum revenvojo ni haltos en Venecio, kie ni pasigos kelkajn horojn ĝis vespero. Nokte la buso traveturos Alpojn kaj haltos en Maria Zell, kaj poste ni veturos jam rekte al Pollando. Vroclavon ni atingos vespere ĉirkaŭ la 19a horo. La buso havas 50 lokojn. Kaptu la okazon kaj aliĝu pli frue por ŝpari monon. La vojaĝkostojn ni petas pagi kiel eble plej frue, limdato **15.06.2003**.

**Atenton!** Ĉiu mem devas prizorgi poŝmonon dum la kongreso.

Vroclavaj organizantoj

# ESPERANTO... kio estas?

- Estas lingvo kompleta kaj viva
- *Lingvo internacia kaj neŭtrala*
- Lingvo facila kaj harmonia

Por kio lerni esperanton?

- Por ekkoni rekte aliajn kulturojn
- Por partopreni kunvenojn lokajn, naciajn kaj internaciajn
- Por gajni geamikojn en la tuta mondo

Kiel lerni esperanton?

- Pere de kursoj pri gramatiko
- Pere de renkontiĝoj kun esperanto-parolantoj

Prezentu vin tuj,
vi vidos ke ĝi estas vere facila kaj ke bone funkcias!

*Krakova Societo ESPERANTO*
Kulturdomo „Podgórze"
str. I. Krasickiego 18-20
30-515 KRAKOVO

(ĉiumerkrede – **horo 16.00**)

tel.: 656-36-70 aŭ 656-44-41

*Klubo de Intelektularo Katolika*
[KIK] *Sekcio Esperanto*
str. Sienna 5
31-041 KRAKOVO

(duan ĵaŭdon de la monato – **horo 15.00**)

tel.: 421-76-60

---

Enkonduki Esperanton en la propra familio. Laŭ psikologio,
ĉiu homo havas sian propran hierarkion de vivceloj.
Tre grava estas edukado de niaj infanoj.

**La interna ideo de esperanto,**
**nome la idealoj de frateco kaj egaleco,**
**ĉu troviĝas ankaŭ en la angla?**

---

# Ridetu ☺ 😐 ☺

Kazjo diskas telefonan numeron kaj ĝentile demandas:
- Halo, ĉu vi estas sankta Nikolao?
- Ne.
- Do kial vi levas la aŭdilon?

* * *

Dialogo ĉe la biletkaso:
- Mi petas bileton por 20 zlotoj!
- Kaj kien vi volas veturi?
- Se vi estas tiom scivola, do mi diros: al kuzo por baptofesto!

* * *

Post la esploro de paciento la kuracisto anoncas:
- Vi estas sana kiel ĉevalo!
- Kion vi diras???
- Nu... vi estas sana kiel fiŝo!
- Diable! Mi ne sciis ke mi trafis al veterinaro!

* * *

Jurek rigardas al la malgranda frateto krieganta en ĉareto kaj demandas:
- Panjo, ĉu estas vere ke anĝeleto alportis lin al ni el la ĉielo?
- Jes, fileto.
- Do mi tute ne miras, ke oni lin de tie forĵetis!

* * *

- Katinjo, kial vi tenas gazetojn en la fridujo? – demandas panjo.
- Ĉar mi volas havi ĉiam freŝajn novaĵojn!

* * *

- Knabeto, vi al kinejo? – miras la kasistino
Ja nun, antaŭtagmeze, vi devus esti en la lernejo...
- En la lernejo? Ja ne! Ja mi havas skarlatinon!